

Legebla unuspire


Silvia Garnero

La aŭtoro de tiu ĉi novelo naskiĝis en Romo la 30an de oktobro 1836 kaj mortis en Milano la 28an de junio 1914, li nur verkis du novelarojn kaj "Senso" aperis kiel lasta el liaj noveloj en la jaro 1883; fakte Kamilo Boito estis arkitekto; tamen "Senso" famiĝis ankaŭ danke al samtitola filmo "Senso" aperinta en 1954 kies reĝisoro estis Luchino Visconti [Lukino Viskonti] kaj kies ĉefrolantojn estis Alida Valli kaj Massimo Girotti [Ĝiroti].

La travivaĵoj estas rakontataj al la leganto pere de la "sekreta kajereto" de la ĉefrolantino, fakte la venetia grafino Livia [Livja] je la epoko de nia novelo estas trideknaŭjaraĝa kaj finfine kuraĝas rakontisian ĝistiaman vivon. Ŝia memoro reiras al la tempo de la plena juneco, kiam, nur dudekdu jaraĝa, Livia antaŭe altirita de la beleco de juna soldato, tuj lin forlasas por edziniĝi al maljuna kaj malforta sed tre riĉa kaj malavara grafo dum la juna, sennoma soldato mortas dum la tiel nomata "tria milito por sendependiĝo". Livia havas apartan karakteron ŝi ĉiam estas malkvieta kaj altirita nur sense de la vira beleco. Fakte ŝi tuj forlasas la edzon kaj, en la venecia etoso varma kaj volupta, estante belega kaj plaĉa virino ŝi sukcesas altiri al si per terura pasio oficiron de la aŭstra armeo Remigio Ruiz [Remiĝo]. La oficiro estas prezentita al leganto kvazaŭ temus pri Adoniso aŭ Heraklo, Remigio estas tre bela kaj fortika viro, sed li estas samtempe malnobla, malmorala kaj cinika. Ĝuste tiuj ĉi malvirtoj de malheroececo altiras sense Livia-n. Tiu anima malnoblo ŝajnas al Livia preskaŭ spuron de neesplezebla vireca energio. La pasio, nur sensa, puŝas Livia-n antaŭ ĉio al la adolto, poste al malespero. Kiam finfine Livia konscias ke Remigio nur celis havi de ŝi monon por povi dizerti de la armeo por vivi diboĉe kaj trankvile dum la milito daŭras, ŝi, sin sentinte humiligita de sia amanto, decidiĝas raporti lian misfaron kaj mortpafi lin tiamaniere. Por sin liberigi de la humiliĝo kaj de la honto Livia faras preskaŭ memanalizon de sia karaktero kaj poste, kiam venas malstreĉiĝon en ŝian menson ŝi tuj alvokas alian amanton, Gino [Ĝino] kiu vere amas ŝin.

Dum la tuta rakonto la leganto tuj povas konscii, ke la verkisto estas fakulo pri arto kaj ne nur verkisto ĉar la etoso kaj la pejzaĝo mem aperas antaŭ la okuloj de la leganto kiel pentraĵoj pri Venecio, kaj la ĉefrolantoj estas preskaŭ marmoraj statuoj firmaj je sia cinikeco.

La tradukisto sukcesis doni al la leganto freŝan kaj allogan verkon kiun oni legas preskaŭ unuspire malgraŭ aŭ danke al la maniero traduki la verkon, kiun, kiel diras Profesoro Karlo Minnaja en sia antaŭparolo al la verko mem, ne estas tute komparebla kun la itala originalo; fakte la tradukinto mallongigis la frazojn kaj iom ŝanĝis la interpunkcion. Eble la tradukita verko ne atingis ĝis nun la merititan disvastigon pro du aferoj: unue oni trovas, dum la legado, tro da eliziojn ĉe la artikolo sekvata de vorto komencanta per vokalo: ekzemple: l'amo, l'okulojn, ktp kaj tio haltigas la legadon; ĉue versajne iu ne itala leganto tute ne kapablas kompreni tuj la elparolo de la propraj nomoj kiuj devus esti skribitaj itale, jes, ja, sed kun Esperanta elparolo interkrampe aŭ piedpaĝe, sed tio ne tro gravas por la bona traduko.



Camillo Boito

Senso

Dobřichovice, 2004

64 paĝoj, 17 cm

€ 4.20

ISBN 8085853728